
No 04
1969

G.L.GIMELLI

# ITALA fervojisto

Organo
Associazione
Italiana
Ferrovieri
Esperantisti



IFEA

## 22-a INTERNACIA FERVOJISTA ESPERANTO-KONGRESO

RIMINI (Italio) de la 16-a ĝis la 22-a de majo 1 9 7 0-a
Konstanta Adreso: Via Donato Creti, 61 = I-40128 BOLOGNA (Italio)

La L.K.K. de la venonta I.F.E.F-Kongreso klopodis presigi du grandformatajn afiŝojn kaj prospekton itallingvan kiu enhavas Esperantan tekston; tiuj afiŝoj kaj prospekto estas senpage riceveblaj el la L.K.K. mem (Via Donato Creti, 61 -I-40128 Bologna). Estis ankaŭ presitaj belegaj glumarkoj, plurkoloraj kun gumo, mendeblaj ĉe la sama adreso. Ili kostas 50 italajn lirojn po folio de 4 glumarkoj. Mendu tuj!

## 40-a ITALA KONGRESO DE ESPERANTO

COMO (Italio) de la 13-a ĝis la 18-a de septembro 1969-a.= OFICIALA KOMUNIKO

La katolika meso en Esperanto okazos dimanĉon la 14-an de septembro je la 8,30 horo ĉe preĝejo "San Giorgio", je kelkcentmetra distanco de la kongresejo. Je la sama horo okazos ankaŭ evangelia diservo en Esperanto ĉe preĝejo "Chiesa Valdese" en Via Rusconi.

La italaj fakaj asocioj, kiuj ankoraŭ ne komunikis la deziron okazigi apartan kunvenon dum la kongreso, estas denove petataj sciigi tion kiel eble plej baldaŭ, por ke la difinitiva programo estu ĝustatempe difinita.

MALMULTEKOSTAJ ARANĜOJ POR GEJUNULOJ: Krom la junulargastejo, oni disponigos litojn en apuda kolegio je po-nokta prezo 550 liroj. Danke al interkonsento kun restoracio, la manĝoj kostos po 550 lirojn. Kampadejo, je ĉirkaŭ 2 km. de la kongresejo, estos je dispono de la eventualaj tendumantoj.

Junulara festo okazos dimanĉon la 14-an de septembro vespere.

## ĈU VI KONAS "LA PRAKTIKO"-n?

Ĝi estas granformata bildrevuo, bona legaĵo por komencantoj kaj progresintoj; ĝi distros kaj amuzos ankaŭ vin. Abonu ĝin tuj!

La jarabono kostas nur 12 nederlandajn guldenojn aŭ 1800 italajn lirojn, 13 G.mk., 14 Svisaj Fr. aŭ 27 internaciajn respondkuponojn. Turnu vin rekte al: UEA, Nieuwe Binnenweg 176 ROTTERDAM-2, Nederlando, aŭ al via peranto.

## ELDONA SOCIETO DE NORDA PRISMO

Eldona Societo estas nove fondita kaj ĝia celo estas eldoni la revuon "Norda Prismo". Por faciligi la vivon de la revuo ni turnas nin al vi por peti ke vi estu membro de nia societo.

Norda Prismo estas la sola, sendependa, literatura kaj internacia revuo en la mondo, tial estas inde ĝin apogi. La kotizo de la Eldona Societo estas 100 danaj kronoj jare. Tre volonte nia administranto E.Frost, Ved Fortunen 16 2800 LYNGBY, Danlando, ricevos vian enpagon, ĉu per ĝiro, ĉeko, mandato aŭ letero. Nia ĝiro: 905 55.

Pli ol la peno
de kunlaborantoj
gravas subteno
de la abonantoj.

Estu kompleta
nun tria kolono:
per-societa
provizo de mono! Paŭl Thorsen

## N I L E G I S

VOCI DELLA ROTAIA: Ĝenerala Direkcio F.S., Piazza Croce Rossa ROMA: Monata revuo de la italaj Ŝtataj Fervojoj. Ĝi publikigis foton kaj klarigan artikoleton pri la esperantaj ekzamenoj en Porretta Terme-Kuracloka urbeto apud Bologna-post la kursoj organizitaj de loka "Dopolavoro Ferroviario"

FEREUROP (FERREUROPA): Informa Bulteno de A.E.C.(Association Européenne des Cheminots) Via Luisa del Carretto, 74/C TORINO. Ĝi entenas foton kaj artikolon pri la esperantaj ekzamenoj en Porretta Terme kiel agado de "Dopolavoro Ferroviario" de la urbeto mem.

NOTIZIARIO D.L.F. DI BOLOGNA. Via del Cane,3 I-40123 BOLOGNA: Monata revuo de Postlabora Fervojista Klubo. Entenas longan artikolon kun foto pri nia 21-a Internacia kongreso en Avignon kaj foton kun instigaj klarigoj pri la esperantaj ekzamenoj en Porretta Terme.

ESPERANTO-BULTENO DE VERONA ESPERANTO-GRUPO, Galleria Astra, I-37100 VERONA: Entenas la jarraporton de la Grupo kaj aliajn interesajn artikolojn.
RAITIS RAUTATIELÄINEN-Ĉe Matti Voltti, Untuvaisenie 4 b B 64 HELSINKI 82 Fnnlando. Revuo de finnlandaj Ŝtataj Fervojoj. Enhavas kvarpaĝojn pri esperantaj novaĵoj: inter alie raportas pri la jarkunveno de la Ĉeĥoslovaka IFEF-Sekcio, kaj publikigas foton de la estraro de la Rumana nova aliĝinta sekcio de I.F.E.F. gvidata de kolego Ioan Sirbu.
FERVOJA TERMINARETO-Germana-Esperanta, Esperanta-Germana eldonita de Germana Esperanta Fervojista Asocio. Mendebla ĉe Gernot Ritterspach, 6070 LANGEN, Berliner Allée 1/5 (Germanio).
FERVOJA TERMINARO-Norvega-Esperanto, Esperanto-Norvega. Mendebla ĉe Norvega Esperantista Fervojista Asocio: Per Johan Krogstie N-2340 LØTEN (Norvegio).
VOJAĜU Kun ĜOJO PER NORVEGA ŜTATA FERVOJO N.S.B.: Nova eldono de bunta E-ta faldfolio fare de la norvegaj Ŝtat-fervojoj kun granda mapo de la lando.
ARGENTINA ESPERANTISTO, Organo de la Liga Argentina de Esperanto. Paraguay 2357 BUENOS Aires. Inter alie, raportas pri la XV-a nacia kongreso de E-to okazinta de la 4-a ĝis la 6-a de la pasinta aprilo en Florencio Varela.
BULGARIO-MALLONGA SKIZO-Poŝformata 120-paĝa libreto (Sofia Press). Ĝi donas interesajn informojn pri la lando de la rozoj, ĝia historio, ŝtata ordo, sociaj problemoj, ekonomio, arto kaj kultura vivo.
ESPERANTO-GAZETO (Nova titolo de I.O.E.-Gazeto): Organo de Internacia Instituto por Oficialigo de Esperanto- Ĉefredaktoro: T.Sekeli, Pop. Lukina, 1, BEOGRAD (Jugoslavio). Tre bela kaj rekomendinda gazeto kiu enhavas aŭdvidan kurson de Esperanto.
HOMO KAJ KOSMO: Esperanto-Revuo. Kvaronjara populara naturscienca Esperanto-revuo eldonita de Astronomia Observatorio de la Kroata naturscienca Societo ZAGREB (Jugoslavio). Ĝi en-havas, inter alie, informojn pri la somerumejo Primoŝteno, la ĉemara Esperantista rendevuejo.
INVITO: Eldonita kiel invito viziti Praha-n kaj Ĉeĥoslovakion en la jaro 1970-a okaze de la IV-a tutŝtata Spartakiado. 100-paĝa libreto kiu entenas multajn bildojn kiuj klarigas la tekston pri historio, arto, geografio de Ĉeĥoslovakio. Ĝin eldonis en 8000 kopioj kaj distribuas Ĉeĥoslovaka Esperanto-Komitato pro la jubileo de la fondiĝo de la ŝtato. Estas ankaŭ listigitaj 133 esperanto-grupoj.
AUSCHWITZ: 105-paĝa libreto pri la fama koncentrejo kun multaj fotoj; eldonita de la Ŝtata Muzeo en Oswiecim (Pollando).
47-a FOIRO DE PADOVA: Plaĉa Esperantlingva faldfolio dukolora, kun itala tre celtrafa propagando sur la lasta paĝo. Ĝi meritas apartan mencion, ĉar la uzado de la Internacia Lingvo en Foiro de Padova fariĝis jam tradicia kaj esperant-lingvaj interpretistoj estas je dispono de la vizitantoj. Senpage ricevebla de: Foiro de Padova, Via N.Tommaseo, 59 PADOVA (Italio).
ESPERANTO-IL MONDO HA VERAMENTE NECESSITA' DI UNA LINGUA INTERNAZIONALE? Itallingva faldfolio trikolora kun tre celtrafaj instigoj. Senpage ricevebla de Gruppo E-sta Bolognese, Via de' Foscherari, 2 I-40124 BOLOGNA.
IL PROBLEMA LINGUISTICO del Prof.Corrado Grazzini, Honora Direktoro Generala de la Itala Instituto de E-to, 24-paĝa libreto eldonita de "Gruppo E-ta Trentino", Via Cavour, 17 I-38100 TRENTO. Ĝi finas per la vortoj de la poeto:"Ni tro malamis kaj suferis.Amu.Bela estas la mondo kaj benita la estonto".
PROPAGANDILO DE LIBRERIA FRANCESCO MORESCHI, Via P.Frattini, 13 I-46100 MANTOVA. Ĝi anoncas la eldonon de nova esperanta gramatiko de Prof-ro Mario Bardini:"Per imparare l'E-to la lingua di tutti i popoli".Lernolibro por italaj komencantoj,kun ambaŭflanka vortaro,116-paĝa, 22x12 cm. broŝurita.
LA LINGUA AUSILIARIA INTERNAZIONALE ESPERANTO.Lingua vivente delle relazioni culturali mondiali. Corrado Cerri, Casella Postale 159 I-13051 BIELLA (Vercelli).Itallingva revuo pri propagando de la linguo Esperanto kaj ĝia interna ideo.
PACO: Oficiala Organo de Mondpaca E-sta Movado "M.E.M."- Eldono de Soveta Unio. Redakta Komitato de Komisiono pri internaciaj ligoj de sovetai E-stoj MOSKVO,K-9, Prosp.Kalinina,14. Kvindekpaĝa ilustrita revuo kun aldonita 50-paĝa libreto kun parolado kaj raporto de I.I.Breĵnev al Supera Soveto de USSR.

NOVA PARLAMENTA INICIATO FAVORE AL LINGVO INTERNACIA ESPERANTO

La 26-an de pasinta majo oni registris, per n-ro 1489, la novan leĝproponon por instruado de Esperanto en la Italaj lernejoj. Kompare al la antaùa n-ro 1816, aprobita de la Deputita Ĉambro dum la lasta parlamenta leĝperiodo, la nova leĝo antaùvidas la gradualan enkondukon de Esperanto ne nur en la mezgradaj superaj lernejoj, sed ankaù en aliaj mezgradaj kaj en la postlernejaj horoj de la 4-a kaj 5-a klasoj de la elementaj lernejoj.

Plie, estas multe pligrandigita la parlamenta bazo favora al Internacia Lingvo; fakte 15 deputitoj el 5 partioj subskribis la leĝproponon:

UNA NUOVA INIZIATIVA PARLAMENTARE IN FAVORE DELLA LINGUA INTERNAZIONALE

Il 26 maggio u.s. veniva registrata, con il n-ro 1489, la nuova proposta di legge per l' insegnamento dell'Esperanto nelle scuole italiane. In confronto alla precedente n.1816, approvata dalla Camera nella scorsa legislatura, la nuova legge prevede l' introduzione graduale dell'Esperanto non solo nelle scuole secondarie superiori, ma anche in quelle di primo grado e nei doposcuola delle 4-5 classi elementari.

Inoltre, si é notevolmente allargata la base parlamentare favorevole alla Lingua Internazionale, per cui 15 deputati di 5 partiti hanno sottoscritto la proposta:

PARTITO SOCIALISTA ITALIANO: Nicolazzi Franco (1° firmatario), Cariglia Antonio, Amadei Giuseppe, Guerrini Giorgio, Napoli Ugo.
DEMOCRAZIA CRISTIANA: Borghi Luigi, Bianchi Gerardo, Micheli Pietro, Miroglio Giuseppe, Lucchesi Primo, Racchetti Arnaldo.
PARTITO COMUNISTA ITALIANO: Benocci Ermanno, Bo Oddino.
PARTITO SOCIALISTA DI UNITA' PROLETARIA: Pigni Renzo.
PARTITO LIBERALE ITALIANO: Giomo Alberto.

HIMNO DE LA EŪROPAJ FEDERALISTOJ

Pro mil teruraj militoj murdaj, ve!
je sango ruĝis ter';
pro cent landlimoj absurdaj,ĝenaj nur,
ĝi vivas en sufer'...
    Sed sur la nokto de la malam'
    leviĝos lumo de amoflam'.
Havos nur unu flagon
Eùropo en memstar',
havos nur unu flagon,
signon de homsolidar'.
Eùropa kolektivo:
jen paco sen kompar';
la ĝojon de la vivo
finfine ĝuos la homar'.
    Eùropo, ho Eùropo!
    la mond' observas vin!
Sen landlimoj, memstarajn regnojn ja,
ligitajn en feder',
vane postulas nun la Eùropa hom',
por vivi en prosper'...
    Vane postulas,sed sur malam'
    leviĝos lumo de amoflam'.
Nur unu parlamento
en noveùropa far',
nur unu parlamento
signo de homsolidar.
Eùropa kolektivo:
jen paco sen kompar';
la ĝojon de la vivo
finfine ĝuos la homar'.
    Eùropo, ho Eùropo!
    La mond' observas vin!

INNO DEI FEDERALISTI EUROPEI

Di mille guerre lo scempio inutile
la terra insanguinò;
cento frontiere balorde e futili
la terra vede ancor...
    Ma sulle tenebre vincerà
    la nuova aurora che sorgerà.
Una bandiera sola
la nuova Europa avrà,
una bandiera sola
simbolo di unità.
E con l'Europa unita
la pace regnerà,
la gioia della vita
l'umanità ritroverà.
    Europa, Europa, Europa!
    Il mondo guarda ate!
Senza frontiere, governi autonomi
su base federal
chiedono invano i nostri popoli
ai governi nazional....
    Chiedono invano, ma vincerà
    la nuova aurora che sorgerà.
Un parlamento solo
la nuova Europa avrà,
un parlamento solo
simbolo di unità.
E con l'Europa unita
la pace regnerà,
la gioia della vita
l'umanità ritroverà.
    Europa, Europa, Europa!
    Il mondo guarda a te!

| | |
|---|---|
| Cento da lingvoj:al miskomprenoj ĝi | Cento linguaggi: odio insanabile |
| nin ĉiam portis nur, | hanno prodotto ognor, |
| kaj Esperanto, lingvo por tuta mond', | e l'Esperanto, lingua dei popoli, |
| rev' bela restas plu. | resta un bel sogno ancor... |
| Ankoraù rev! sed ĝi venkos jam | E' ancora un sogno, ma vincerà |
| kun nova lumo de amoflam'. | la nuova aurora che sorgerà. |
| Eùropo per helplingvo | Ed una lingua sola |
| konkordon trovos, ĉar | la nuova Europa avrà, |
| per simpla interlingvo | poiché una lingua sola |
| ĝi fariĝos kunfratar'. | gli uomini affratellerà. |
| Eùropa kolektivo: | E con l'Europa unita |
| jen paco sen kompar', | la pace regnerà, |
| la ĝojon de la vivo | la gioia della vita |
| finfine ĝuos la homar'. | l'umanità ritroverà. |
| Eùropo, ho Eùropo! | Europa, Europa, Europa! |
| la mond' observas vin! | Il mondo guarda a te! |

Versoj kaj muziko: D-ro Alberto Menabene. Esperanta traduko: Luigi Minnaja
Eldonanto: Petro M.Urbaitis-Piazza S.M.Ausiliatrice,54- I-00181 ROMA Italio.

## AGADO DE LA BOLOGNA-KATEDRO DE LA ITALA INSTITUTO DE ESPERANTO

PORRETTA TERME-Post la Esperanto-kursoj organizitaj de "Dopolavoro Ferroviario" en Porretta Terme, danke al la klopodoj de ties Prezidanto S-ro Buscaroli kaj de nia membro S-ro Pivari, la 4-an de majo 1969-a okazis la unugradaj kaj du-gradaj ekzamenoj de E-to, ĉe la sidejo de D.L.F. Partoprenis al tiuj ekzamenoj n-ro 4 komencantoj kaj n-ro 7 progresintoj.
BOLOGNA-Post la Esperantaj kursoj organizitaj de "Dopolavoro Ferroviario" ĉe la profesia lernejo de la Ŝtataj Fervojoj en la Centra Stacidomo de Bologna kaj ĉe la Mezgrada Ŝtata Lernejo "Guido Reni", la 1-an de junio 1969a, okazis ĉe la sama lernejo la ekzamenoj al kiuj partoprenis sep kandidatoj.
TINTORIA DI MINERBIO (Bologna)-Danke al interesiĝo kaj sindediĉo de F-ino Norma ZACCONI, filino de nia amata kaj neforgesebla Prezidanto G.Zacconi, nunjare ankaù en la elementaj lernejoj, okazis Esperantaj ekzamenoj.
En Tintoria, malgranda vilaĝo ĉe la komunumo de Minerbio, F-ino Zacconi, kun la permeso de la lerneja direktoro, instruis Esperanton al ĉiuj geknaboj de la 5-a klaso kun brilaj rezultoj, kiuj estis evidentigitaj dum la ekzamenoj okazintaj la 2-an de junio en la lernejo mem kun la ĉeesto de la Direktoro. Subtenis brile la ekzamenojn 14 geknaboj.
VENEZIA-Laù instigo de IFEA kaj kun la helpo de loka "Dopolavoro Ferroviario", niaj membroj en Venezia organizis ĉe la sidejo de D.L.F. mem, memlernantan kurson al kiu partoprenis plurdekoj da personoj. La 22-an de junio okazis, ĉe la luksa salono de D.L.F. en la stacidomo Venezia S.L. la,por komencantoj ekzamenoj en kiuj partoprenis 10 memlernantoj.Ĉiuj brile sukcesis.

## E S P E R A N T O  E N  L A  R A D I O

RADIO ROMA-ESPERANTO - Casella Postale 320, I-00100 ROMA. La dissendoj okazas de la h.21 ĝis la 21,20 (M.E.T.). Ondlongoj: metroj 25,42;30,90 kaj 41,24. Fakestro: D-ro Renato CORSETTI. La dua parto de ĉiu dissendo estas dediĉata al "Kuriero de Esperanto"; la unua parto al la ĉi subaj temoj:
AŬGUSTO 1969-a: Dimanĉon la 3-an: La itala poeto Eugenio Montale. 10-an: La vet-rajdado honore al la Ĉieliro de Maria en Siena. 17-an: Kie la italoj pasigas libertempon. 24-an: Como, la urbo de la 40-a Itala Kongreso de E-to. 31-an: Somera saluto.
SEPTEMBRO 1969-a: Dimanĉon la 7-an: Tra la literaturo. 14-an: Novaĵoj el Italujo. 21-an: Italaj kanzonoj en Esperanto. 28-an: Leterkesto.
OKTOBRO 1969-a: Dimanĉon la 5-an: S-ta Francisko kaj la lupo el Gubjo. 12-an: Kristoforo Kolumbo. 19-an: Italaj belartaj urboj: Ascoli Piceno. 26-an: Reĝino Kristina el Svedujo en Romo.
SVISA RADIO-ESPERANTO DISSENDOJ-BERNA - Programo de la 4-a de majo ĝis la 1-a de novembro 1969-a: lunde kaj merkrede je la 13,05 h.; ĵaùde kaj sabate je la 22,50 h. (laù M.E.T.). Ondlongoj: metroj 31,46 kaj 48,66.